WIKIPEDIA

Irlanda lingvo

La **irlanda lingvo** (irlande: *Gaeilge*) estas gaela kelta lingvo, kiu estas parolata en Irlando. En Irlando homoj kiuj politike malŝatas la lingvon nomas ĝin 'la gaela', sed lingvistike kaj laŭ la irlanda konstitucio de 1937 oni nomas ĝin **la irlanda lingvo**, **la ejra lingvo**, aŭ **la irlanda** en familiara uzado. (La nomo 'gaela lingvo' estas kelkfoje konfuzebla kun la skot-gaela lingvo, parolata en Skotlando.)

Irlanda lingvo (*Gaeilge*)	
Parolata en	Irlando, Britio (ĉefe Nord-Irlando)
Parolantoj	276 310
Denaskaj parolantoj	proksimume 355.000
Fremdlingvo / dua lingvo por	1.860.000 iom da kono
Skribo	latina
Oficiala statuso	
Oficiala lingvo en	Irlando kaj Nord-Irlando
Reguligita de	Foras na Gaeilge
Lingva statuso	3 sendube endanĝerigita
Lingvaj kodoj	
Lingvaj kodoj	
ISO 639-1	ga
ISO 639-2	gle
ISO 639-3	gle
SIL	?
Glottolog	iris1253
Angla nomo	Irish
Franca nomo	irlandais
Vikipedio	

Specimeno

La Patro Nia

Ár n-athair, atá ar neamh,
Go naofar d'ainm.
Go dtaga do ríocht.
Go ndéantar do thoil ar an talamh,
Mar a dhéantar ar neamh.
Ár n-arán laethúil tabhair dúinn inniu,
Agus maith dúinn ár bhfiacha,
Mar a mhaithimidne dár bhféichiúna féin.
Agus ná lig sinn i gcathú,
Ach saor sinn ó olc.
Áiméan.

Ekde la 13-a de junio 2005 la irlanda lingvo estas 21-a oficiala laborlingvo de la Eŭropa Unio. Tiu decido efektiviĝis la 1-an de januaro 2007, kaj la irlanda ministro Nollaig Ó Treasaigh, T.D. estis la unua ministro kiu parolis irlande dum kunveno de la Konsilio de Ministroj de EU, la 22-an de januaro 2007.

La irlanda estas parolata tra la insulo, kaj en Respubliko de Irlando (*Éire/Poblacht na hÉireann*), kaj en Nord-Irlando (*Tuaisceart na hÉireann*). Ĝi estas la nacia kaj unua oficiala lingvo de Irlando.

Post la helena kaj latina lingvoj, la malnovirlanda estas eble la plej malnova literatura lingvo en Eŭropo, kiu daŭre skribatas ekde la sesa jarcento. La unua teksto kiun ni ankoraŭ posedas estas "Amra Choluim Cille", pri la vivo de la sanktulo Colm Cille, el la jaro 597.

En 1366 la anglaj okupantoj de Irlando faris la unuajn leĝojn kontraŭ la uzo de la irlanda lingvo fare de la anglaj koloniistoj, kiuj siatempe pli kaj pli asimiliĝadis kun la irlandanoj, la "Statutoj de Cill Chainnigh" (angle 'Kilkenny'). Sed kiam en 1541 la angla reĝo Henriko la 8-a volis proklami sin "reĝo de Irlando", oni devis laŭtlegi la proklamon irlande en la parlamento de la koloniistoj en Dublino, ĉar plejmulto el ili ne plu komprenis la anglan.

Fine de la 19-a jarcento la irlanda preskaŭ malaperis: pro la malsatego de 1845-1849, en kiu unu ĝis du milionoj mortis pro malsato; pro la naciaj bazlernejoj ekde 1831 kiuj malpermesis la irlandan kaj trudadis la anglan; kaj pro la kreskanta uzado de la angla fare de irlandaj naciaj politikistoj; nur 3% da la loĝantaro 3 aŭ 4 jaraĝa parolis irlandlingve ĉiutage en 1891. La lingvo oficialiĝis en 1922 kiam Irlando sendependiĝis, kaj ĝi fariĝis deviga lingvo por ĉiuj lernantoj en la bazaj kaj mezaj lernejoj. Dum la lasta jardeko ĝia uzado plipopulariĝis kaj la lingvo pli kaj pli fariĝas

laŭmoda. Ekde 1996 ekzistas televidstacio irlandlingva, "TG4", kaj ekde aprilo 2003 ĉiutaga ĵurnalo eldoniĝas en Nord-Irlando por la tuta insulo, "Lá" (Tago). Estas ankaŭ radio-stacioj: *Raidió na Gaeltachta*, kiu estas nacie dissendata tra la tuta Irlando, *Raidió na Life* por la irlandparolantoj de la ĉefurbo, Dublino (irlande: *Baile Átha Cliath*), *Raidió Fáilte* por Nordirlando, kaj oni povas aĉeti ĉiudimanĉan gazeton nomatan "Foinse" (Fonto).



Elcento da parolantoj de la irlanda lingvo

En julio 2003 la irlanda parlamento akceptis novan leĝon por antaŭenigi la irlandan lingvon, la "Leĝon pri Oficialaj Lingvoj 2003". Por detaloj en la irlanda kaj angla lingvoj, rigardu [1] (http://www.pobail.ie).

Antaŭnelonge, la irlanda lingvo formale rekoniĝis en Nord-Irlando, sub la Interkonsento de Sankta Vendredo de 1998 kune kun malgranda minoritat-lingvo nomata la ulster-skota. (Malgraŭ tio, estas malkonsentoj, ĉu la ulster-skota estas aparta lingvo aŭ nura dialekto de la skota 'malalteja'.)

Enhavo

Gaeltacht
Lingvistika strukturo
Instituto
Lingvadefenda Organizaĵo
Skribmaniero
Irlandlingvaj vortoj internacie uzataj
La irlanda kaj Esperanto
Bildgalerio
Vidu ankaŭ
Eksteraj ligiloj
Referencoj

Gaeltacht

Estas lokoj en Irlando, kie la irlanda estas la ĉefa lingvo. Oni kune nomas ĉi tiujn irlandlingvejojn la *Gaeltacht*. La plej famaj irlandlingvejoj estas en Conamara (en la graflando de Galivo/Galway/*Gaillimh*, en Donegal/*Dún na nGall* kaj en la duoninsulo de An Daingean/en la graflando de Kerry/*Ciarraí*. Aliaj estas en "Waterford"/Port Láirge ("An Rinn") kaj Meath/*Mí*.

Lingvistika strukturo

Al kelkaj nekonantoj, la skribaĵo ŝajnas esti sensensa mikso de vokaloj kaj konsonantoj! Kiam oni komprenas ĝin, tamen, la ortografio ŝajnas esti logika kaj facila. La dekstrakorna supersigno, nomata la *fada* (◌́), plilongigas la sonojn de la vokaloj kaj kelkfoje ŝanĝas iliajn elparol-manierojn. La ŝanĝoj varias inter dialektoj - ne estas universala, parola formo de la lingvo (kvankam ekzistas unu ĉie-akceptata skriba formo), sed ekzistas nune tri apartaj dialektoj de la irlanda, kiuj estas la munstera, la konoĥta kaj la ulstera.

En la 1940-aj jaroj, la Registaro de Irlando eldonis la "*Caighdeán Oifigiúil*" ([KAJ-djan I-fi-gjujl], normigon oficialan), kiu plifaciligis kaj normigis la ortografion. Multaj vortoj perdis literojn silentajn, kaj la vokalkombinoj plisimiliĝis al la parolata lingvaĵo. Ekzemple:

- *Gaedhilge/Gaolainn/Gaedhlaing => Gaeilge*, "la irlanda lingvo"
- *Lughbhaidh => Lú*, "*Louth* (loknomo)"
- *biadh => bia*, "manĝaĵo"

Instituto

La oficiala instituto pri la irlanda lingvo, kiu aktiviĝas en la tuta insulo de Irlando, nomiĝas Foras na Gaeilge. Ĝia estro estas Seosamh Mac Donncha.

Lingvadefenda Organizaĵo

La plej malnova kaj granda lingvadefendorganizaĵo nomiĝas Conradh na Gaeilge. Ĝia estro en januaro 2007 estas Dáithi Mac Cárthaigh.

Skribmaniero

Gaela tiparo Corcaigh

La presita formo de la lingvo sekvis la modelon de unciala alfabeto, kreitaj de frumezepokaj irlandaj monaĥoj, kiuj konservis la kristanan kulturon post la falo de Okcidenta Romia Imperio.

En la 20-a jarcento, tamen, la uzado de tiu ĉi tradicia alfabeto malpliiĝis ĝenerale, kaj oni ŝanĝis al la ordinara latina alfabeto.

Irlandlingvaj vortoj internacie uzataj

Kelkaj irlandlingvaj vortoj kaj frazoj, multuzataj en moderna Irlando inter angleparolantoj, estas:

- *Uachtarán na hÉireann* [UAĤ-tar-AN na HE-ran] (Prezidento de Irlando)
- *Áras an Uachtaráin* [AR-as an UAĤ-tar-AN] (Loĝejo prezidanta)
- *Taoiseach* [TI-ŝaĥ] (Ĉefministro, ekde 1937)
- *Tánaiste* [TA-niŝ-te] (Vicĉefministro, ekde 1937)
- *Dáil Éireann* [dAl E-ran] (Parlamentejo)
- *Seanad Éireann* [Ŝa-nad E-ran] (Senato irlanda)
- *Teachta Dála* [TJAĤ-ta DA-la] (Parlamentano; uzata kiel "TD".)
- *Príomh-Aire* [PRI-vara] (Ĉefministro 1919-1921)
- *Éire* [E-re] (Irlandlingva nomo por la insulo Irlando, uzata ankaŭ por la ŝtato de Irlando ekde 1937. Fonto de "Ejrio")
- *Saorstát Éireann* [SER-stat E-ran] (Nomo de la Libera Irlanda Ŝtato, en la irlanda, 1922-1937)
- *Ard-Rí* [ARD-ri] ("Alta Reĝo" (de Irlando), nomo de la feŭda irlanda ĉefreĝo en la mezepokaj tempoj)
- *Radio Teilifís Éireann* [Ra-dio Te-le-fiŝ E-ran] (Irlanda nacia televid-servo, RTÉ)

- *Fianna Fáil* [FIA-na fal] (La plej granda irlanda politika partio, tradukante: "Soldatoj de Irlando".) [FI-na fal]
- *Fine Gael* [FIN-e gEl] (La sekvante plej granda politikogrupo, tradukante: "Familio de la gaeloj".)
- *bodhrán* [BAŬ-ran] (granda drumo, ludata en kelteca muziko)
- *Sinn Féin* [ŝin fEn] (politika partio tutirlanda, tradukante: "Ni Mem")
- *Tiocfaidh ár lá* [tjok-hig Ar-lA] ("nia tago venos", slogano de la irlanda respublika armeo, IRA, kiu kunfandiĝis kun la politika partio "Sinn Féin".
- *poitín* [Po-tjIn] (Speco de kontraŭleĝa, forta alkoholo)
- *céilí* [KJE-lji] (socia kunveno, kun interparolado, muziko, dancado kaj rakontado)
- *leipreachán* [LEP-re-ĤAN] (eta, petolema, supernatura kreito)

La irlanda kaj Esperanto

Seán Ó Riain, en sia artikolo *La lernado de la irlanda lingvo: ĉu helpe de Esperanto?* post mallonga priskribo de la irlanda lingvo kaj ties historio, skizas kelkajn similaĵojn de tiu kun Esperanto. Konstatinte la malsukceson de lernado de lingvoj en la eduksistemo de Irlando kaj de la irlanda kaj de aliaj lingvoj kiel la franca tradicie aŭ la germana pli ĵuse, la teksto proponas la uzadon de Esperanto kiel propedeŭtika aŭ lernfaciliga studobjekto. Fine de la artikolo montreblas listo de koincido de vortoj aŭ radikoj en Esperanto kaj la irlanda.[1]

Bildgalerio

Foto kun loĝlokoj en la angla kaj irlanda lingvoj.

lateinisch	Aa	Ee	Ii	Oo	Uu
gälisch(kurz)	Aa	Ee	Ii	Oo	Uu
gälisch (lang)	Áá	Éé	Íí	Óó	Úú

Longaj kaj mallongaj vokaloj

Ŝildo en la irlanda formas lingvan pejzaĝon.

lateinisch	Bb	Cc	Dd	Ff	Gg	Ll	Mm	Nn	Pp	Rr	Ss	Tt
gälisch	Bb	Cc	Dd	Ff	Gg	Ll	Mm	Nn	Pp	Rr	Ss	Tt

Konsonantoj en Cló Gaeltach

Vidu ankaŭ

Lingvistiko

Listo de lingvoj

Eksteraj ligiloj

- Enkonduko pri la irlanda unciala alfabeto (http://www.evertype.com/alphabets/irish-gaelic.pdf) (*angle*)
- Gramadach na Gaeilge / la Gramatiko de Irlanda lingvo (germanlingva) (http://www.braesicke.de/gram.htm)

- Kiel la irlanda povas adaptiĝi al Interreto? (https://eo.globalvoices.org/2020/04/8388/), Global Voices en Esperanto

Referencoj

1. ↑ Seán Ó Riain, *La lernado de la irlanda lingvo: ĉu helpe de Esperanto?*, en La arto labori kune – Festlibro por Humphrey Tonkin, Roterdamo, 2010, UEA (ISBN 978-92-9017-113-3) paĝoj 178-183.

Elŝutita el "https://eo.wikipedia.org/w/index.php?title=Irlanda_lingvo&oldid=6947222"

Ĉi tiu paĝo estis lastafoje redaktita je 08:30, 26 apr. 2020.

La teksto disponeblas laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite-Samkondiĉe 3.0 Neadaptita; eble aldonaj kondiĉoj aplikeblas. Vidu la uzkondiĉojn por detaloj.